

ESPERANTO EN LA NACIA BIBLIOTEKO

Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto, la Nacia Biblioteko de Hispanio organizis bibliografian ekspozicion pri Esperanto.

Ĝi okupas la kvar vitroŝrankojn situantajn inter la halo de la Biblioteko kaj la ĉambreto kiu donas eniron al la ĉefa lego-salono. Oni aliras ĝin per la ĉefa enirejo, sed estas bezonate posedi leganto-karton. Tamen, akiri ĝin estas tuja kaj senpaga. La ekspozicio daŭros ĝis komence de majo.

La ekspozicio enfokusiĝas ĉefe sur la esperantaj eldonitaĵoj aperintaj nialande kaj konsistas el kvar aksoj. Unue ĝi prezentas specimenojn el la unuaj publikigaĵoj en Hispanio. La dua pritraktas la figuron de Juan Régulo Pérez, stimulantulo kaj eldonanto de esperantaj verkoj ekde 1952. La tria akso montras la verkaron de la ĉefaj hispanaj nuntempaj aŭtoroj. Laste oni montras miksaĵon de verkoj, kiujn diverskiale oni povas konsideri gravaj.

Ĉi tiu iniciato de la Nacia Biblioteko ja dankindas, ĉar ĝi helpas diskonigi la verkojn, kiujn en Esperanto aŭ pri Esperanto oni eldonis en Hispanio. Cetere, en 2012 oni jubileas ankaŭ la 300-jariĝon de la Nacia Biblioteko, bona okazo por sendi al ĝi gratulon pere de Facebook aŭ Twitter pro ĝia datreveno kaj pro la iniciato en rilato al nia lingvo. Ne hezitu fari!

Okaze de la ekspozicio, MEL provas organizi grupon por peti kolektivitan viziton por esperantistoj.

La vizito ne havos kiel ĉefan celon la ekspozicion pri Esperanto, sed la kutiman itineron ene de la biblioteko kun montrado de la plej interesaj lokoj kaj kelkaj el la ĵuveloj konservataj tie. Tamen, ĝi faciligos la eniron por vidi la esperantaĵojn, ĉar ili troviĝas en la interna parto. Ĉiel ajn, jam ene, eblas eventuale iom pli longe ol kutime halti en tiu ekspoziciejo. Eĉ sen la verda kialo, la vizito estus per si mem interesa.

La unuaj demarŝoj ĉe la Biblioteko estis pozitivaj, sed ni devas kolekti kelkajn datumojn antaŭ ol fiksi daton kaj horon. Ni devas diri al la responsuloj kiam ni preferas la viziton, ĉu matene aŭ vespere, nepre en labortago (la daton kaj horon ili fiksos, certe post Pasko). La grupo estos maksimume dudekopa. Skribu al la adreso de MEL se vi interesiĝas pri partopreno.

VIZITO DE MONDVOJAĜANTA FAMILIO

La familio Sans, gepatroj kaj tri filoj, kiu de antaŭ du jaroj travojaĝas la mondon, pasigas du semajnojn en Madrido. Ili vizitis la sidejon de Liceo la lundon 26-an, kaj denove vizitos nin, ĉifoje por prezenti siajn travivaĵojn kaj aventurojn, la lundon 2-an de aprilo. Ni forte rekomendas la ĉeeston, ĉar iliaj spertoj estas vere interesaj. De la 18,30, en Liceo.

Depende de la intereso, eble ili povos rendevui kun ni, malpli formale, denove en kafejo 4D, la sabaton 7-an de aprilo, en la kutima horaro.

Meze de la monato ili flugos al Argentino, por daŭrigi sian vojaĝon laŭlonge de Sudameriko, unu plian jaron.

Vidu iliajn retejojn: detale en la franca lingvo <http://www.les1001bornes.ch/> kaj esperante pri iliaj renkontiĝoj kun esperantistoj: <http://www.ipernity.com/home/limstonoj1001>.

LIBROFOIRO NE OKAZOS

Fine de marto ni ricevis leteron de la organizo de la Libro-Foiro, indikante, ke la organiza skipo de la LibroFoiro de Madrido ne akceptis la proponon de MEL, do, bedaŭrinde, la partopreno de la esperantaj organizaĵoj ne okazos.

ANONCITA PROGRAMO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Kiel ni jam informis antaŭe, venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Almagro (Ciudad Real) de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo. La Organiza Komitato ĵus diskonigis la programon, en kiu eblos ĝui tre interesajn kulturajn, turismajn kaj distrajn aktivaĵojn.

En la urbo de la Teatro, oni ĝuos du teatrajn spektaklojn. Unu el ili en la fama Teatrokorto. Kaj ankaŭ estos prezentata spektaklo, *Vivu la teatro!*, partopreniga, sub la direktado de Miguel Fernández, en impresiga loko: la municipa teatro, neoklasika konstruaĵo kiu ĉefrolas la kulture vivon de la provinco.

Ni ĝuos omaĝon al la dudekjariĝo de la prezentado de la **Ibera Skolo** de literaturo en Esperanto, kun la partopreno de kelkaj el la plej elstaraj el tiuj verkistoj, kaj la salutoj de tiuj kiuj ne povis veni.

La muziko estas alia tre altira parto. Sabate post la inaŭguro ĝojigos nin la *Kvaropo Sinkopo*, kiu jam akompanis nin diversfoje en Madrido. Sed ni ankaŭ havos rekomendendajn vizitantojn: la katalunia grupo *Kaj Tiel Plu*, kiu koncertos malferme por esperantistoj kaj almagranoj en publika placo.

Ankaŭ la turisma flanko anticipas frandindas. Ĉefe vizitindas la urbo Almagro mem, inklude de la Muzeo de Teatro, la Etnografia Muzeo kaj la Ĉefplaco. La lundon ni faros longan ekskurson al la koro de Manĉo, en Campo de Criptana, kun vizito al la famaj ventmuelejoj kaj al tradicia vinkelo. Merkredon la 2-an de majo oni programis postkongreson, por tiuj kiuj povos resti, kun vizito al la natura parko Tablas de Daimiel.

Ne mankos filmoj, prelegoj, ludoj, atelieroj, babiladoj, diskutoj, debatoj, asembleoj, prezentoj de asocioj, libroservo, kaj multo pli. Pliaj informoj kaj aliĝoj en <http://esperanto.es/kongreso>.

Hispana Kongreso 2012

Congreso Español de Esperanto

Esperanto 125 años derribando fronteras
jarojn fuliganta limojn



Almagro

27 abril/aprilo - 1 mayo/majo 2012

EKSPOZICIO

Kiel anoncote en pasinta numero, inter la 1-a kaj 14-a de marto, MEL organizis ekspozicion pri Esperanto en la Kultura Centro Buenavista de Madrido, pere de la paneloj kreitaj de HEF okaze de la 150a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Ankaŭ okazis prelego lunde la 5-an de marto, fare de Toño del Barrio, kun rimarkinda ĉeesto de interesiĝintoj, plejparte maturaĝaj.

MADRIDA PROGRAMO

La kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la grupo.

Ĉimonate, okaze de la Paskaj festoj, la babilrondo en kafejo 4D disvolviĝos la 21-an de aprilo, kvankam, kiel antaŭe komentite, eble ni povos rendevui kun familio Sans la 7-an.

La kursoj gvidataj de Pedro Hernández plu daŭras ĉiusabate matene, de la 11-a horo. Vizitu <http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid>.

Novajoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/ aŭ en la nova forumo <http://esperanto.creatufo.com/>

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com